*RECENZO (rh)*

***Dan DINER (IL)***
*'Das Jahrhundert verstehen: eine universalhistorische Deutung'*

# La jarcenton kompreni: universalhistoria interpretado

*Luchterhand Literaturverlag GmbH, München* (DE), 1999
ISBN 3-630-87996-9 (384 p., DEM 49.80)

*Diner* ekzamenas la politikajn okazaĵojn lau du niveloj:
- sur la antauaĵa konfrontado de la valoroj kaj ideologioj kaj
- subaze de la tradiciaj konfliktoj de hegemonio kaj nacieco traditaj el la 19a jarcento. Kaj li ne priskribas el la centro, sed el la europa periferio.

La 'malvarma milito' estas por li epoko de la neutraligo, kiu okazis inter la grandaj eventoj de la unua duono de la jarcento kaj la evoluo post la disfalo de la pseudokomunisma-kapitalisma antagonismo.

*Diner* estas direktoro de la Instituto por Germana Literaturo en *Tel Aviv* (IL) kaj estas ankau docento en la Universitato *Essen* (DE).

Li provas universalhistorian interpretadon de nia jarcento: centra akso de tiu epoko formiĝas el la malŝatego inter individua libereco kaj lauvorte komprenita egaleco surbaze de la oktobra revolucio en 1917. El ĝi rezultas la mond-intercivitana milito (*Welt-Bürgerkrieg*) 1917-1989, interrompita nur per la esceptosituacio de 1941-45, en kiu tempo gravis la rebato de la biologiorasisma defio de la nazismo. La germana nacionalsocialismo diferenciĝis de la okcidenta liberala universalismo fundamente same kiel de la bolŝevisma internacionalismo. Post la detruo de la nazismo finiĝis la armistico inter libereco kaj kavazauegaleco: denove akcentuiĝis dum pli ol 40 jaroj, eĉ kun pli grava intenseco, la batalo pri la valoroj.

La koncepto de la lauvorta komunisma egaleco disrompiĝis pro la misrilato en la politika ekonomio, pro la enkatenigo de la produktivpovoj per politike dekretitaj produktadrilatoj; la libereco kontraue evoluis pere de novaj teknologioj al produktivpotenco. La maladekvata koncepto de la pseudokomunismo, kiu fakte estis ŝtatkapitalismo, estiĝis la malsupera varianto de la privatorientita mondkapitalismo.



En ĉapitro 'Nacio kaj Revolucio' montras la autoro, ke la revolucia elano - post la ribelo de la Pariza Komuno en 1871 - malproksimiĝis el la europaj centroj, kie ĝi restis socialreforme enkapsuligita. La revolucio denove eksplodis nur pro la militlaciĝo en la februar-revolucio en 1917 kaj atingis, pro la eksterlandaj intervenoj, sian eksterordinaran rangon surbaze de a klasbatalo.

En Germanio la revolucio post la unua mondmilito estis sufokita de la tiama provizora registaro kun la preteksto 'ne subfosi ankorau pli la teritorian pluekzistadon' de la venkita ŝtato - sufokita ĝuste per la samaj socialdemokratoj, kiuj komence de la milito eĉ ebligis ĝin helpe de konsento al la militkreditoj.

Ekzemplo de nekonvencia pririgardo de historia evento estas la transiro de la unua germana respubliko en la *Hitler*-reĝimon: ŝlosilan eventon vidas la autoro ne en la dato de la fina instaligo de *Hitler* (31a de januaro 1933), sed jam je la 27a de marto 1930, kiam la lasta parlamenta registaro finiĝis; ĉar mankis en Germanio forta ekvilibriga parlamenta centro, kontraue al Anglio kaj Francio, falis la socialdemokrata registaro sub la premo de la sindikatoj, kiuj en la tiama ekonomia krizo de la amassenlaboreco *devis* rebati la intencon, forpreni socialajn atingaĵojn, akiritajn post la perdo de la milito. Ne stringence ekestis la transiro al la *Hitler*-diktaturo, tio estis kontraue kontingenca okazaĵo, kiu okazis cetere laukonstitucie. Certe, ne estis eble la pluekzistado de la malforta Weimar-sistemo, sed estis eble alia maldemokrata okazaĵo - do ne la demokratio, sed alia diktaturo kiel ekz. 'stato de kriza ĝenerala mizero' (*Staatsnotstand*) estus povinta deteni la nazistojn de la potenco. Sed tiam, post la instaligo de la nazisma sistemo, sekvis stringence kaj lauprograme la faŝisma biologizado de la socialo.

La instaligo de *Hitler* evidentiĝis fakte kiel grava politika eraro: *Franz von Papen* kaj lia kabineto de la baronoj estis rigardata tro reakcia, *Kurt von Schleicher* kaj lia *Reichswehr* tro revizionisma, oni do taksis Hitler la plej facile majstrebla varianto de ĉiuj malbonaj

solvoj; sed ĝuste la Hitlera ekpreno de la potenco evidentiĝis ekzemplo pri la estiĝo de la plej malbona el ĉiuj ebloj. La amasigo de hazardaj momentoj kaj de arbitraj decidoj kondukis al la fatalo - de la triumfaj nazistoj nomita 'providenco' (*Vorsehung*).

Alia ekzemplo de specifa Diner-a historio rigardo estas la priskribo de la hispana intercivila milito, kiu validas kvazau idealtipa konfrontado inter la potencoj de la faŝismo kaj de la antifaŝismo en Europo. La klasika faŝismo kiel social-revolucia movado havis sian historian ejon (*topos*) rekte post la unua mondmilito kiam la itala faŝismo de *Mussolini,* iama militanta socialisto, sukcese ribelis kontrau la t. n. 'stumpigita venko'. La posta germana interkonsento kun Italio estis subtenita per la eksteropolitika kalkulo, tremigi la sistemon de la kolektiva sekureco en Europo, kiun intencis Britio, ankau la franca burĝaro kaj eĉ Stalin, kiu bezonis pacon por interne purig-militumi cele al 'ekstarigo de socialismo en unu lando'. Certe, en 1936, Sovetio malkonsentis pri la ne-enmiksado de la 'okcident-potencoj' vid' al vide al la germana-itala interveno en Hispanio kaj poste malkonsentis vid' al vide al sia ekskludo el la Munkena Konferenco en 1938, pro ebla malfortigo de la sovet-pola landlimo. Sed Sovetio reagis alie kaj eĉ ŝokige per forlaso de la *status quo* favore al la paradoksa aroko de la Hitler-Stalin-pakto en augusto 1939, kiu mondvaste desorientis la ideologie bonkredemajn komunistojn.

*Diner* vidas en la hispana intercivitana milito ne la ikonon de la mondvasta batalo de klasoj kaj ideologioj, sed batalon pri pozicioj ene de reviziisma kontrauokcidenta antaumilita stato. La intencoj de *Stalin* estis ne internaciismaj, sed ĝuste 'stalinismaj' [vidu pri tiu demando recenzon kaj postrimarkon en SR vol. 47 (1996)(2) p. 51-54]. La antibolŝevismaj intervenoj de *Hitler* strebis ĉefe al potencpolitikaj celoj kaj kaŝis la ultrareviziisman germanan ekspansiismon. Memkomprene fundamente diferenciĝas la nazisma antibolŝevismo de la okcidenta liberala universalismo. Biologismo kaj rasteorio ne estas kategorio de politika milito, sed de rasideologie akcentuita popoluma nacionalismo. La okcidenta 'antikomunismo' estis politika kaj antisocialisma, tiu de la nazistoj estis de biologisma naturo surbaze de kategorioj de vivospaco kaj raso ligita al



rasideologia ekstermado-milito ne nur kontrau judoj, sed ankau kontrau slavaj popoloj kaj poste kontrau ĉiuj ne-germanaj popoloj.

*Stalin* ne prenis serioze tiun ideologion de la nacionalsocialismo, tia ideologio ne respondis al lia koncepto de politiko, en kiu ĉio estis senprincipe submetita al la potencposedo. Por li estis la imperialisma Anglio el geografia kaj historia vidpunkto la pli danĝera kontrauulo de Sovetio.

La grava turnopunkto for de la proleta internacionalismo okazis - ne nur lau *Diner* - jam en la polosoveta milito en 1920, kiu estas rigardata kiel unu el la decidaj bataloj de la nova historio. La kontrakto de *Riga* en 1921 fakte finigis la mondrevolucian puŝdirekton de la soveta revolucio okcidenten. Sekve de ties limregulado ŝanĝis la rusa revolucio en la direkton de kreado de soveta ŝtato kun konstituiĝo de nova ŝtatpotenco. La marista revolto en *Kronstadt* estiĝis la unua interna viktimo de la nova ŝtateco.

La necesa revolucia ponto de Sovetio al centraleuropo estis jam interrompita sekve de la rumanohungara milito, aranĝita lau francaj intervenaj intencoj, per la paco de *Trianon* en 1920. La strategia interligo de la reĝimo *Belà Kun* en Hungario kun la Ruĝa Armeo malsukcesis. La t. n. 'miraklo ĉe Vistulo' estas vidita jam kiel sekvo de ensoveta diferenco, *a posteriori* kiel antagonismo inter mondrevolucia koncepto de la puŝo okcidenten (de *Tushachevski*) kaj de la perspektivo de la 'socialismo en unu lando' flanke de *Stalin* kaj de la seneraloj de la sudokcidenta fronto ĉe *Lemberg*. La funkcio de Polio kiel 'ruĝa ponto' de la revolucio kun ĉiuj ekspektoj al revoluciaj sukcesoj en Germanio rompiĝis; ĉiuj revoluciaj leviĝoj estis sufokitaj de la germana armeoĉefestro *von Seeckt*. Pli poste, ĝuste li pledis por germanosoveta kunlaboro kontrau Polio kaj la pacodiktato de Versailles, kies komunaj perdintoj estis Germanio kaj Rusio-Sovetio.

*Diner* interpretas la centron kaj la kontraudirojn en Europo el la orienta periferio. Sidante kvazau sur la ŝtuparo de *Odessa,* famekonata el la filmo 'Krozoŝipo Potemkin' de *Eisenstein*, li vidas tiun arkon de politika nestabileco, kiu etendiĝas de la Baltaj Landoj kaj Pollando en nordo suden al Balkano, Turkio kaj Kaukazio, eĉ Transkaukazio. En tiu vasta regiono estiĝas formiĝo de nacioj. Dum

en la nacionalŝtatoj de la okcidenta Europo, en la 19a jarcento, la regantaj klasoj sukcesis, ĉiam denove, fiagitadi la popolojn reciproke, nome de patrolando au patrinotero, en novajn militojn au koloniajn buĉadojn, la nacioformiĝo en tiu periferio estas akompanata per mezuroj de la nova ŝtateco kontrau la popoloj, kiuj troviĝas historie ene la novkreitaj limoj. Ankau la soveta ŝtato militis, per obskuraj stalinismaj akuzoj, kontrau sia propra popolo. Sed *Diner* priokupiĝas antau ĉio pri la motivoj de genocidaj tendencoj ene de populacio de la sama teritorio. Tiu t. n. 'etna purigado', kiu fakte estas ŝtate tolerita murdado, estas konstituiva komponanto de la nacio-igado, antau ĉio sur Balkano kaj en la iama osmana reĝlando. Terura ekzemplo estiĝis la balkanmilitoj 1912/13 kaj la murdado de la armenoj far la turka reĝimo en 1915, sed jam en 1894 kaj 1896 okazis masakroj. Per multa sango estis kreitaj novaj nacioj kaj estis generitaj etnaj lojalecoj.

Ĝuste post la disfalo de la religie sufiĉe tolerema osmana reĝlando ekestis kompleksa proceso de etnoigo de la religio: la ŝanĝo de religiaj komunumoj de la imperio en naciojn. La tradicia personeco-principo estis anstatauigita de teritoriaj ordigokonceptoj, la regionoj kompreniĝis iom post iom naciaj, kaj ekestis ĝis nun ne evidenta proporcio de plimulto kaj minoritato. Okazis la naciigo de ĝis nun sin religie komprenintaj grupoj.

Klasika ekzemplo estas la eĉ ĝis hodiau ne solvita t. n. Makedonia problemo, kiu rolis ankau en la greka civila milito depost 1945 ĝis 1949. *Diner* elmontras, kiel ĝuste la malkapablo de Britio, pro propraj ekonomiaj malfacilaĵoj, plue subteni la monarkistan partion, estiĝis la *translatio imperii*, la transdono de la hegemonio al la nova mondpotenco Usono. La sekva deklaro de la *Truman*-doktrino (12a de marto 1947) estis la fino de la izoliteca epoko de Usono kaj la komenco de la malvarma milito en Europo, la rekomenco de la ideologia rivaleco pri valoroj kaj mondkonceptoj.

La pincipe antikolonia kaj libermerkata Usono, kiu favorigis la Atlantik-ĉarton kaj la rajton al memdecido de la popoloj, komencis kontraustariĝi 'ĉie en la mondo' al tio, kiun ĝi supozis komunisma. Konsekvence Usono enfalis en la embuskon de la virulenta franca kolonidefenda histerio (majo 1954 *Dien Bien Phu*) kaj de la t. n. domeno-teorio, lau kiu ĉiu koloniomilito kaj ĉiu anstatauantomilito en la Tria Mondo estis benita per la *McCarty*-agitado de la antikomunismo. Gravis nur favoraj strategiaj pozicioj, ekonomiaj kaj etnaj kauzoj kontraue restis nekonsideritaj. Tio dauris ankorau, kiam la germana ministro por eksteraj rilatoj *Genscher* fieris pri la disbato de la posttitoisma Jugoslavio pere de la hasta kaj mispripensite senkondiĉa aprobo. La unuigo-mito, lau optimisma programo pri la 'fino de la historio' (*Francis Fukuyama*), kiu tiel 'bone kaj usone' funkciis en 1989, estis definitive detruita,. La optimismo baziĝis sur la mistaksado de la historiaj fortoj, kiuj formis Europon komence de la 19a jarcento. Tiurilate ekmontriĝas la nacionalismo kiel janusvizaĝa heredaĵo de la racionalisma epoko, unuflanke memdecida, aliflanke ŝovinisma (la esprimo devenas de la rekruto *Chauvin* el la komedio de *Cogniard "La cocarde tricolore"* - 1831; estas tipo de maljuna soldato entuziasma pri Napoleono I; sed hodiau estas esprimo pri rabia nacionalisto).



Rilate al la grava problemo de la etnismo Diner evoluas - postkiam etno kaj nacio denove estiĝas agoj de la historio - la ideon de la 'longdauraj memoroj' (*longue durée*) de etno, geografio, potenckonstelacioj kaj el ili rezultantaj tradiciaj konfliktoj. Tipa ekzemplo estas la t. n. 'orientalaj demandoj', virulenta en la 19a jarcento post la establo de Grekio kiel unua etna ŝtatfondiĝo. Por Diner reprezentiĝas etno kiel kompleksa historia memoro. Historia agado kaj politika taktikado rezultas ne nur el la okazaĵo. sed estiĝas kompreneblaj lau la deformigo per *topoi* kaj ĉifroj de kolektivaj memoroj. Estiĝanta nacio estas komprenita kiel komunumo, kiu estas etne determinita kaj historie fondita. Rezultas iu nacionala memdetermino kun la sekvo de ŝtatfondiĝo sur etna bazo. Poste sekvas la postulo de la aligo de popolgrupo al jam ekzistanta, nacionale 'parenca' kaj teritorie proksima politika unuiĝo: la redentismo [*Irredenta*: la ankorau ne-redemptorita Italio].

La t. n. 'Parizaj-antauurbetaj-kontraktoj' post la unua mondmilito servis al la reciproka minoritato-protektado. La tempo inter la du mondmilitoj estis ŝarĝita per konfliktoj, kiuj rezultis el la malakordo inter nominalnacioj kaj minoritatoj, influitaj parte per religiaj

diferencoj, parte per ekonomiaj malavantaĝoj. En la Baltiko ekestiĝis el la miksado de socialaj, etnaj kaj potencpolitikaj motivoj la ŝanĝiĝo de klaso en raso, el kio sevis poste virulenta antisemidismo. La konsekvenca totalisma teroro sub *Stalin* kondukis al klasmurdado, en la nazismo al popolmurdado.

En tiu konekso diskutas *Diner* la okazaĵon, ke sociaj grupoj, kontraue al naciaj, fakte ne kapablas elformi la 'longan memoron', tiaj suferantoj estiĝas *a posteriori* etnige interpretitaj.

La ekflamo de la konscie provokita plej juna etna 'Balkanmilito' estas la Bosnio-dramo kaj la Kosovar-tragedio, nova *irredenta* surbaze de la slogano 'Serbio estas kie serboj loĝas' - kaj kie, el kiuj ajn kialoj, aliaj popolanoj ne havas rajtojn. La trista rezulto estas politika disiĝo de la militantoj: la refalo en kvazaureligian stultecon kaj pseudoprogresan arogantecon, kiuj difinas, kie homaj rajtoj estas bombardendaj kaj kie ili estas globalige malutilaj - du sentaugaj alternativoj de la plej juna moderneco.

Akompana Literaturo.

"La jarcento de la militoj" - Gabriel Kolko (USA)

*Das Jahrhundert der Kriege, Verlag S. Fischer, Frankfurt a. M.* 1999, 446 p.

La militoj de ĉi tiu jarcento evidentiĝas kiel historio de gravaj miskalkuladoj, baziĝantaj sur la stulteco de la t. n. politikaj elitoj. La plej maljuna motivo de la milito estas la gajno de lando kaj de predo. Por la regantoj milito estas nur la daurigo de la merkato per aliaj rimedoj kaj la *classe politique* aro de hipokritaj banditoj.

"Trans la koro de mallumeco" - Sven Lindquist (SE)

***Durch das Herz der Finsternis*** - Afrikovojaĝanto sur la sulkoj de la europdevenaj genocidoj, Campus Verlag 1999, 230 p.

La ekskurso sekvas la ideologiojn de rasismo kaj kolonialismo, gvidmotivo por la civilizaciaj taskoj de la blankuloj en Afriko estas la frazo el *"Heart of Darknes"* de *Joseph Conrads*: "vi ekstermu ĉiujn tiujn bestojn". En sia *"Politische Geographie"* (1897) priskribis *Friedrich Ratzel* nome de la evolucio, do nome de la sciencoj, tiujn popolojn kaj rasojn, kiuj estas kondamnitaj al pereo.



La germana imperiestro *Wilhelm II* prenis tion lauvorte kaj igis masakri preskau la tutan popolon de la Hereroj, ĉ. 80000, helpe de la mitraloj (*Diner*). Nur kelkaj jardekoj pli poste sekvis la konsekvenco de la kolonialisma ekspansio en Europo mem per la lausistema murdigado de ĉ. ses milionoj judoj, ciganoj kaj anoj de aliaj t. n. malaltvaloraj rasoj kaj homoj.

Ankorau en 1954, post la malvenko ĉe Dien Bien Phu, la franca kolonialismo furiozis kontrau la alĝeria ribelo, la *'mission civilisatrice'* dronis en la sango de Madagaskaro, Indioĉino kaj Alĝerio.

La vivospaco por la imperialismo kaj por ties religioj postulas kaj toleras, hodiau nome de la globaligo, kiel necesan proceson la genocidon kiel neeviteblan subprodukton de la 'progreso' (t. n. *collateral damages*).

Entute reprezentiĝas la jarcento kiel epoko de la totalitarismo pere de totala mobilizo. Helpe de ideologiaj metaforoj estas ankau en Europo generacioj masakritaj en krucaj militiroj por la patrujoj, helpe de religiaj metaforoj la politiko mem estas sakrilegia. Dekstra kiel maldekstra totalitarismo institucias la unuecan partion kun elita pretendo difinante ĉiam denove novajn kategoriojn de malamikoj. Praekzemplo de la pramalbono de la homaro estas la misiisma verecpretendo de la monoteismaj religioj kaj ties konfesioj, kiuj mem estiĝas - en la totala materialisma ŝtato - viktimoj pro ĝia transcenda graco-oferto.

En la praktika politiko iu ajn superordigita intereso de iu normiga klaso pravigas kaj legitimas facile la bonan konsciencon de la perforto.

La redakcio volas atentigi al pli frua artikolo, kiu rilatas al la sudslava-serba politika programo:

***'Naĉertanie' de Garaŝanin - ideologia bazo de ŝovinisma programo'*** de Marenglen Verli (AL), aperigita en Scienca Revuo Vol. 46 (1995)(2) - 167 p. 44 - 49.